

Deseĝnajo de Václav Lamr



Ĉar hodiaŭ estas naskita por vi, en la urbo de David, Savanto, kiu estas Kristo, la Sinjoro.

Kaj ŝi naskis sian unuan filon, kaj ŝi ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon, ĉar ne estis loko por ili en la gastejo.

Li venis al siaj proprajoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis.

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +(0)420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Membroj de IKUE pagas €10,-. Abonoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

ENHAVO

Dia Regno, prediko en Zöblitz	123
Miraklo en Mongolujo	127
Monologo pri Toto	128
Kion signifas la Reformacio por la eklezia muziko – tiutempe kaj hodiaŭ, 500 jarojn poste?	129
Aliĝintoj al la EEK en Poděbrady	134
Eldonejo KAVA-PECH jubileas	135
Kristana amo – kiel agas	138
Membrokotizoj 2018	140
Informetoj	142
Aŭtunaj ŝtormoj muĝas	144

Redaktoraj vortoj

Karaj legantoj, jam finis la reformacia memorjaro. Unu kaŭzo por la reformacio estis la malkontento kun la tiama eklezio kaj ĝiaj instruoj kaj formoj. Laŭ la reformatoroj oni devis reiri al la origino de la kredo kaj tielfarante samtempe pensi nove; defii la tradiciojn sed serĉi la originan bazon.

La reformacio ankaŭ metis la bazon por bibliaj tradukoj por ke homoj povu legi la Bibliion en sia propra lingvo, kompreni kaj interpreti la Vorton. Vivi en la spuroj de la reformacio ne nur signifas ke ni kantas la tiamajn kantojn kaj restas je la ideoj de Lutero kaj liaj kunreformatoroj, sed ankaŭ signifas ke ni daŭrigas la interparolon kaj interpretadon pri vivo, kredo kaj Vorto.

Vivanta eklezio postulas vivantajn dialogon kaj interparolon. Eble la plej valora dialogo estas tiu, kiun ni faras kun iu ne-sam-ideano el kiu ambaŭ povas kreski. Kiam ni baldaŭ festos la naskiĝon de Jesuo, eble ni iom pripensu kiel ni daŭrigos la ideojn de la reformacio. Feliĉan kristnaskon!!

Dia Regno

Prediko dum la kongreso en Zöblitz, 2017

Václav POSPÍŠIL, CZ

- Mat 3,1 En tiuj tagoj venis Johano, la Baptisto, predikante en la dezerto de Judujo kaj dirante: Pentu, ĉar alproksimiĝis la regno de la ĉielo.
- Mat 4,17 Tiam Jesuo komencis prediki kaj diri: Pentu, ĉar la regno de la ĉielo alproksimiĝis.
- Mat 13,44 La regno de la ĉielo similas al kaŝita en kampo trezoro.
- Mat 13,45 Cetere, la regno de la ĉielo similas al komercisto, serĉanta belajn perlojn Mat 13,47 Plue, la regno de la ĉielo similas al reto.
- Mat 18,23 Tial la regno de la ĉielo similas al reĝo, kiu volis fari kalkulon kun siaj servistoj.
- Mat 20,1 La regno de la ĉielo similas al domomastro, kiu eliris frumatene.
- Agoj 1,3 Post sia suferado Jesuo montris sin al la apostoloj vivanta per multaj pruvoj, dum kvardek tagoj aperante al ili kaj parolante pri la aferoj de la regno de Dio.

Karaj gefratoj, mi tralegis nur kelkajn menciojn pri la Regno de Dio. Fascinas min, kiel la evangelioj estas trateksitaj per vortoj, per alvokoj, per paraboloj pri Dia Regno. *Pentu, ĉar alproksimiĝis la regno de la ĉielo.* Per tiu ĉi alvoko komencas sian agadon Johano, la Baptisto.

Ankaŭ Jesuo komencas sian predikadon per la samaj vortoj. Sian deklaron Jesuo ĉiam pli konkretigas. En la paraboloj li desegnas komencon de la Regno, ĝian kreskon, eĉ pluaj ĝiaj ecoj. Kian gravecon li aljuĝas al Dia Regno, ni vidas el tio, ke ankaŭ post sia resurekto dum kvardek tagoj parolis kun siaj disĉiploj pri la aferoj de la Regno de Dio. Entute centfoje mi trovis en la evangelioj kaj en la komenco de la Agoj

de la apostoloj, menciitan Dian Regnon. Evangeliiisto Mateo plejparte skribas pri la Regno de la ĉielo. Li skribas por la Judoj, kiuj Dian nomon prefere transkribis per la vorto ĉielo. Apostolo Johano nur dufoje parolas pri la Dia Regno – dum la Jesua nokta konversacio kun Nikodemo. Mi klarigas tion al mi per tio, ke Johano kompletigas Mateon per spirita vidpunkto kaj per konkreta priskribo de Jesua agado.

En kio konsistas Dia Regno? Ĉu ĝi jam estas ĉi tie sur la tero? Ĉu ni vivas en ĝi? Jesuo komencas sian predikon per aserto, ke ĝi alproksimiĝis. Baldaŭ tamen li proklamas: Ĝi estas inter vi. Ĝi estas en vi. Li parolas pri ĝia kresko – per la rapideco de fermento; pri ĝia grandeco – el eteta semeto elkreskos

granda arbo. Malgraŭ tio, en la tempo de Jesua surtera agado, ni ne povas distingi ĝiajn precizajn konturojn. Certe pro tio, ke la tempo de Jesuo estis mallonga kaj Jesuo devis plenumi ĝin per la proklamo de la Regno kaj per la instruo. Plue liaj disĉiploj, ĉu la plej proksimaj, ĉu tiuj, kiuj kolektadis sin homamase ĉirkaŭ li, Jesuon ne komprenis. Ili atendis, ke venos la regno politika. Ili atendis, ke Jesuo alvokos dek du legiojn de anĝeloj, elpelos malamatajn okupantojn kaj sidokupos tronon de Davido en Jerusalemo. Kaj ili estiĝos liaj ministroj. Pro tio, la praktikadon de Dia Regno ni povas observi nur en la vivo de apostoloj post la ricevo de la Sankta Spirito. Post Jesua resurekto ili jam devis forlasi siajn imagojn kaj Jesua kvardektaga instruo preparis ilin por la praktika vivo en lia Regno.

Kion ni legas? Ĉiuj kredantoj estis kune kaj havis ĉion komune; *kaj ili vendis siajn havaĵojn kaj posedaĵojn, kaj*



Václav Pospíšil. Fotis Olda Fischer

dividis ilin al ĉiuj laŭ ĉies aparta bezono. Kaj ĉiutage vizitadante unuanime la templon, kaj dispecigante panon dome, ili prenis sian nutraĵon kun ĝojo kaj unueco de koro, laŭdante Dion kaj havante favoron ĉe la tuta popolo. Kaj la Sinjoro aldonis ĉiutage al la eklezio la savatojn.

Kiom ili rigardis tion grava, ni komprenas el tio, ke la samo estas ankoraŭfoje akcentita: *Kaj la anaro de la kredantoj estis unukora kaj unuanima, kaj neniu diris, ke io el sia havaĵo estas propra al si; sed ĉe ili ĉio estis komuna.* Tiu ĉi priskribo de la komuna propraĵo kaj la vendado de ĉio, ne povas esti modelo por ni. Por la disĉiploj de Jesuo tio estis memkomprenebla afero. El liaj profetaĵoj ili sciis, ke Jeruzalemo estos ĉirkaŭigita per la armeo kaj detruita. Siajn posedaĵojn ili ĉiukaze perdis. Pro tio estis plej prudente eluzi ilin al la profito de malriĉaj kunfratoj.

Kiel manifestiĝis Dia Regno plue? La ĝojiga bonanonco de Jesuo envenis en la mondon de paganoj. Kontribuis al tio, ke la juda nacio ĝin, en sia plejparto, ne akceptis. Plie ili komencis persekuti tiujn, kiuj ekkredis en Jesuon kaj akceptis lin kiel sian Savanton. Tiom pli la ĝojiga bonanonco disvastiĝis inter paganoj.

La situacio tamen ŝanĝiĝis. La kristanismo enpaŝis en la grekan mondon, kiu malkovris racion, intelekton. Estis necese defendi la kristanan mesaĝon per la racio. Komencis elvolviĝi la teologio. Plie en la granda multo de filozofantaj kristanoj komencis ekesti diferencaj konceptoj kion kaj kiel kredi. Ne plu la vivo, sed la vero estiĝis decida

vidpunkto. Oni povas diri, ke prefere tiuj, kiuj estis persekutataj per oficiala eklezio, estis tiuj kiuj vivis veran Jesuan vivon en la malriĉeco kaj amo. Tiuj postulis la eklezion malriĉan kaj puran. Valdanoj, la Gefrata unuiĝo kaj aliaj. Certe, ankaŭ en la oficiala eklezio ekzistis grupoj, kiuj vivis veran kristanan vivon, sed ili estis tamen minoritataj.

Signife estis, ke eĉ protestantismo, kiu ekestis el la malkonsento kun la vivo de la oficiala eklezio, esprimis sin en tiu ĉi kontraŭstaro per la teologiaj terminoj kaj teologiaj disputoj. Esprimis tion eĉ mem Martin Luther. Al la fratoj de Gefrata unuiĝo li diris: *Vi havas pli bonan vivon, tamen ni havas pli bonan teologion*. Tiu ĉi situacio daŭras siamaniere ĝis hodiaŭ. Ni, unuopaj komunumoj de kristanoj ne sukcesas interkonsenti, pri kio ni kredas. La unuopaj paroĥoj preskaŭ ne malsimilas laŭ la agado. Ili ne estas kiel membroj de la korpo, kiuj kunlaboras kaj kompletigas unu la alian. Ili diferencas per sia aparteno al diversaj eklezioj. Ili diferencas per la teologio. Paralelo al tiu bildo de la korpo, kiun uzas Paŭlo, en kiu unuopaj korpaj membroj kompletigas unu la alian, ni prenas kiel bildo *en* unuopaj komunumoj. Tiu bildo devus validi ankaŭ ĉe la interrilatoj *inter* ĉiuj komunumoj.

Kio estas la plej grava en la Dia Regno? Certe ni rememoras parabolon pri la multevalora perlo. Pri komercisto, kiu serĉas belajn perlojn. La komercisto ne serĉas perlojn, pro tio ke ili plaĉas al li. Li ne faras hejme el ili kolekton por montri ĝin al la amikoj, por fanfaroni per ĝi. Li serĉas ilin, por ke ili ebligu al

li vivi. Per ili li enspezos pli ol li pagis, kiam li aĉetadis ilin. Kiam li trovos unu multevaloran, diras Jesuo, li vendas ĉion, kion li havas, por povi aĉeti ĝin. Per tiu ĉi multevalora li enspezos ankoraŭ pli multe ol per tiuj nur belaj.

Jesuo diris tiun ĉi parabolon pri Dia Regno, ne pri si mem. Li diris: *La regno de la ĉielo similas al komercisto, serĉanta belajn perlojn. Kaj trovinte unu multevaloran perlon, li iris kaj vendis ĉion, kion li posedis kaj aĉetis ĝin*. La Regno de Dio do postulas peneman serĉadon.

Kion oni devas trovi? En la menciita parabolo parolas Jesuo pri homo, kiu trovas trezoron en la kampo. Ni konas tiujn hodiaŭajn trezorserĉistojn, kiuj ne observas, kiu estas posedanto de la kampo. La trezoron ili elprenas, iam la kampon ili eĉ difektas. La homo, pri kiu Jesuo parolas, devis multe klopodi por aĉeti la kampon. Li vendas ĉion, kion li posedas, ĉar la trezoro ebligas al li vivi pli bone, ol vivis li ĝis nun.

Kio estas tiu trezoro, kio estas tiu perlo, kiun iu trovas hazarde aŭ pere penema serĉado? Kio estas la plej grava, kiam ni serĉas la Regnon de Dio? Trovi la Reĝon. Trovi Jesuon. Jesuo kaj la ordinara vivo, la neceso manĝi kaj trinki kaj loĝi kaj labori, ne kontraŭstaras unu al la alia. Jesuo ne serĉas disĉiplojn kiel budhismo, kiu instigas homojn forlasi laboron kaj dediĉi sin al la meditado kaj akceptadi de aliaj vivrimedojn. Certe, ankaŭ en la Jesua Regno devas esti homoj kiuj forlasos ĉion, kiuj vendos ĉion, kion ili posedas, kaj iras kun Jesuo, predikas lian Regnon. Eble ili eĉ ne edziĝos, ne edziniĝos, ĉar ilia strebado

ne permesos tion al ili. Apartenas tamen al Jesua Regno ankaŭ familioj, kie patroj, patrinoj devas zorgi pri la bezonoj de siaj infanoj, pri ilia edukado. Devus aparteni al lia Regno ankaŭ politikistoj, kiuj prizorgos bezonojn de nacio kaj ŝtato. Ĉiuj loĝantoj de nia planedo devas aparteni al Dia Regno. Kaj ni ĉiuj havas unu bezonon, neceson – trovi, ekkoni, akcepti Reĝon de tiu ĉi Regno. Trovi, ekkoni, akcepti Jesuon kiel la plej gravan valoron en la mondo. Trovi Jesuon, kiu helpas al ni vivi pli bone.

Kion signifas trovi Jesuon, la Reĝon de Dia Regno? Ĉu ni povas diri: Dankon, Jesuo, ke mi ekkonis vin, ke mi vin havas, ke mi povas vivi kun vi? Vivi pli bone ol mi vivis – pli bone hodiaŭ ol mi vivis hieraŭ. Dankon, ke mi scias, ke mi apartenas al via Regno. Kiam mi povas tion diri, tiam Jesuo estas la plej grava en mia vivo.

La samtempuloj de Jesuo rigardis manĝon kaj trinkaĵon la plej gravaj por siaj vivoj. Same kiel la nuntempuloj. Jes, tio estas necesa por la surtera vivo. Jesuo tamen diras: Kiam vi trovos min, vi trovos manĝaĵon, kiu ebligas al vi ne vivi nur por via korpo, nur por ĉi tiu mondo, nur por ĉi tiu vivo. Mi satigos vin, por ke vi vivu pli bone. Ĝoje. Feliĉe. Pace. Ne nur por vi mem, sed ankaŭ por la aliaj, por mia Regno, por la tuta mondo, kiun mi volas ŝanĝi.

Per tio ni komencos: Mi dankas al vi, Jesuo, ke mi vin trovis. Ke vi konigis vin al mi. Vi estiĝis por mi la trezoro, la multevalora perlo. Mi ne estas tia riĉulo, ke mi nur montros vin en la vitrino, ke mi montros vin same kiel kolekton de poŝtmarkoj, kiel propran privatan gale-

rion. Vi konigis vin al mi, por ke mi povu pli bone vivi, fari ion ankaŭ por aliaj, por larĝigi vian Regnon, mia Reĝo.

Eble jam ĉe tiaj vortoj plenigos nin varmiga sento. Eble ne. La sentoj ne estas la plej gravaj. Grave estas, ke ĉiun situacion kaj ĉiun bezonon ni povas solvi kun Jesuo.

Tio estas la unua gravaĵo – ni havas Jesuon. Senĉese ni povas vivi kun li. Havi scion, ke li vivas en mi, ke li volas efiki pere de mi. Ni povas demandi lin kaj ni povas, eĉ ni devas atendi lian respondon.

La dua gravaĵo estas lia Regno. La Regno kiu al li tiom kuŝis en la koro, ke pro ĝi li forlasis la ĉielon kaj venis inter nin. Do, ekzistas pluaj demandoj. Ĉu mi plenumas iajn taskojn en la eklezio, aŭ mi plenumas miajn religiajn devojn, aŭ mi vivas mian spiritan vivon, – aŭ mi klopodas pri Regno de Jesuo? Klopodas, por ke Dia Regno estu ĉie kie estas mi?

Ĉu mi scias, ke Jesuo volas, ke Dia Regno plenumu tutan teron? Ĉu mi scias, ke Jesuo volas, ke ni ĉiuj partoprenu tion kun li? Por ke plenu nin la ĝojo ne nur el tio, ke ni apartenas al Jesuo kaj povas vivi kun li, sed ankaŭ pro tio, ke ni vivas en lia Regno. Ni vidas ĝian kreskon. Plenumiĝon de ĉiuj liaj paraboloj.

Ĝis kiam ni foje kunvenos kun Jesuo, li ne demandos, ĉu ni kredis la transsubstanciigon aŭ transsignifigon aŭ ion alian. Li demandos nin, ĉu ni vidis bezonulon kaj ĉu ni helpis al li.

Apostolo Paŭlo diris al ni, ke ĉiu scio estas laŭparta kaj foje finiĝos. Sole amo neniam neniigis.

Amen.

Miraklo en Mongolujo

Vilĉjo GOLDSMITH, US

Kun afabla permeso mi ĉerpis la informon por ĉi tiu artikolo el la revuo Alliance Life (Alianca Vivo, la oficiala revuo de la evangelia eklezio Alianco Kristana kaj Misiista) el la eldono de septembro/oktobro de 2017.

Jintae Kim estas pastoro de evangelia preĝejanaro en orienta Usono. Li okaze vojaĝas al Mongolujo por instrui mallongajn teologiajn kursojn al evangeliaj pastoroj. Antaŭ kvin jaroj, la pastoro Geelot vojaĝis du tagojn por ĉeesti kurson de Jintae Kim en la urbo Erdenet. Unu dimanĉon kiam finiĝis la kurso, ŝi ĉeestis diservon de preĝejanaro en Dinz, kie predikis Jintae Kim. Post la diservo, li invitis la homojn kiuj deziras preĝon por resanigo ke ili kuniĝu en la “ger” (doma tendo) apud la konstruaĵo de la preĝejanaro. Geelot aperis inter la homoj kiuj deziras preĝon.

Antaŭ preĝi por ŝi, Jintae Kim demandis pri la kialo kial ŝi deziras preĝon. Ŝi respondis, “Dum sep jaroj, mi suferas kanceron en la reno.” Kvankam Jintae Kim estis invitanta la homojn, kiuj bezonas preĝon por resanigo, en tiu momento li tre maltrankviliĝis! Li pensis, “Mi estas instruisto, mi ne estas resanigisto. Ĉi tio estas kancero. Eĉ kuracistoj ne povas fari ion por kancero de sep jaroj.”

Malgraŭ siaj duboj, Jintae Kim metis la manojn sur la kapon de Geelot kaj li

preĝis por ŝia resanigo. La matenon poste, antaŭ la foriro de la gepastoroj, Geelot kaj aliaj homoj atestis al Jintae Kim ke ŝi mirakle estas resanigita. Jintae Kim ne kredis ilin kaj pensis ke ili nur deziris kuraĝigi lin!

Unu jaron poste, Jintae Kim reiris al Mongolujo. Li renkontis Geelot kiu invitis lin al tre bongusta manĝo, kiun ŝi kaj ŝia patro preparis por li. Geelot rakontis al li, “Kiam vi preĝis por mi, brulanta varmo fluis tra mia tuta korpo



Geelot, resanigita de kancero en la reno



Jintae Kim ŝmiras virinon kun oleo kaj preĝas por ŝia resanigo

kaj ĝi forprenis ĉiujn miajn dolorojn. Mi sciis ke mi estis tute resanigita. Reveninte hejmen, mi vizitis la publikan klinikon de la urbo por certiĝi pri mia resanigo. La personaro de la kliniko konfirmis ke mi estas tute resanigita.”

Post ŝia resanigo, Geelot establis du preĝejanarojn. Ŝi unue vojaĝis al Boro-Ondor, urbejo en la Suda Gobi, por evangelizi sian fratinton, monricevisto de fakturoj pri elektro kaj akvo. La fratino de Geelot iĝis kredantino. Kune

ili establis preĝejanaron en la urbo kaj la fratino fariĝis la gvidanto. Tiam Geelot establis preĝejanaron en loĝejo apud mino de kvarco proksime de Bireq Xot.

Jintae Kim diras ke pro la resanigo de Geelot, li pentis pro sia manko de fido. La resanigo de homoj fariĝas tre grava afero de lia servo en Mongolujo. Li jam ne maltrankviliĝas se li havas la donacon de resanigo aŭ ne. La homoj alvenas kun fido kaj espero, kaj Dio rekompencas ilin kun miraklaj resanigoj.

Kiam Jesuo Kristo piediris ĉi tie sur la tero, Li forsendis siajn apostolojn, “kaj Li donis al ili aŭtoritaton super malpuraj spiritoj: ... Kaj foririnte, ili predikis ke oni pentu. Kaj ili elpeladis multajn demonojn, kaj ŝmiradis per oleo multajn malsanulojn kaj ilin sanigadis.” (Evangelio laŭ Sankta Marko 6. 7, 12, 13)

La servantoj de Jesuo Kristo ankoraŭ predikas ke la homoj pentu; ili ankoraŭ elpeladas demonojn; ili ankoraŭ resanigadas la malsanulojn.

Glorata estu Jesuo Kristo!



Monologo pri Toto

La patro de Toto enskribis lin en la privata lernejo, li eliris laste kun 4 averaĝe. Lia patro enskribis lin en la publika lernejo, li eliris ĉiam la lasta fi kun 4. Lia patro enskribas lin ĉi-foje en la katolika lernejo kaj li iĝas la 1-a de la klaso. Lia patro demandas lin “kial ĉe la privata kaj publika lernejo vi estis la lasta kaj en la katolika lernejo vi eliras la unua de la klaso?” Toto respondas: “Kiam mi alvenis tien mi vidis studenton najlita al la kruco. Ĉi tie mi komprenis, ke la mastroj ne ŝercas, kaj ke mi devus labori diligente aŭ je la risiko suferi la saman sorton.

Redaktita de Honoré SEBUHORO honsebn@gmail.com

Kion signifas la Reformacio por la eklezia muziko – tiutempe kaj hodiaŭ, 500 jarojn poste?

Prelego dum la kongreso en Bratislava 2016

Ernst LEUZE, DE

Karaj, mi komencas paroli pri la nuna eklezia muziko. Se ni komparas la eklezian muzikon en diversaj reformitaj eklezioj kun tiu en la romkatolika, ni ne povas konstati gravajn diferencojn. La nura diferenco ŝajnas esti, ke la romkatolika muziko estas pli riĉa (almenaŭ en kelkaj regionoj).

Sed tuj post la reformacio estis inverse. Unuflanke, la transdonita maniero de la kantado, plenumita de la klerikoj uzante melodiojn gregoriajn. Aliaflanke, la riĉa trezoro de ekleziaj kantoj kun simplaj melodioj kantitaj de la popolo kaj de ĥoroj de amatoroj.

Do, ĉu la reformacia, rilate al rom-

katolika, eklezia muziko estas plena fiasko? Eble?

Konsiderante tion mi povus fini la prelegon.

Sed ...

Ni havas la kantolibron ADORU kun multaj ekzemploj pri la temo. Kaj ni estas elita grupo de homoj. Do, mi povas promesi interesan pliprofundigon en la temon.

La motivo por mia prelego ja estas la 500-jara jubileo de la reformacio. Dum la jaro 2017 oni memorigas la faman alfiksadon de la 95 tezoj pere de Marteno Lutero je la 31a de oktobro 1517. Hodiaŭ oni estas preskaŭ certa, ke tiu evento estas legendo. Ni nur scias, ke Lutero en tiuj tagoj sendis leterojn al kelkaj episkopoj kaj aldonis la tezojn, sian kontribuon al la disputo pri la teologia temo de la indulgenco. Tiuj tezoj ne estas publike proklamitaj de li. Nur poste kelkaj liaj amikoj multobligis kaj disdonis ilin.

Sed la homoj preferas tiajn drastajn bildojn por memori gravajn historiajn mejloŝtonojn.

Pli bone elektita estas la okazo por la jubileo de la svisa reformita eklezio: Je la 1a de januaro 1519 transprenis Ulriko Zvinglo (Huldrych Zwingli) la postenon



Ernst LEUZE en Bratislava

de pastro en la Granda Monaĥejo (Grossmünster) de Zuriko.

La plej bonan okazon ni trovas en la kalvina tradicio: la naskiĝtago de Johano Kalvino, (Jean Calvin): la 10an de julio 1509. En la mondo kalvina tiu jubileo jam estas vaste festita.

Kompreneble la reformantoj ne inventis la revizion de la eklezio. Ekzistis pioniroj jam antaŭe. Ekzemple Jan Hus kaj la Morava Frataro. Ili verkis ekleziajn kantojn en la loka ĉeĥa lingvo. Per la traduko en la germanan fare de la husana pastoro Michael Weisse, Marteno Lutero konatiĝis kun tiuj altvaloraj kantoj. Li kaj aliaj reformaciaj aŭtoroj lernis verki similajn kantojn. Vidu ADORU 173 (Die Nacht ist kommen) kaj 350 (O komm, du Geist der Wahrheit). Legu mem!

Estus false, limigi la temon je Lutero. Li ja vere estis tre grava reformanto, sed

la du aliaj samtempuloj Ulriko Zvinglo kaj Johano Kalvino estas tiel gravaj, ke mi devas konsideri ankaŭ ilin.

Zvinglo estis, rilate al la muziko, la plej tragika konata persono. Sendube li havis la plej bonan talenton por muziko. Li ludis preskaŭ ĉiujn konatajn instrumentojn. Vera mult-talentulo! Bedaŭrinde li ne povis integri sian muzikan talenton en sian filozofian kaj teologian mondokoncepton. Eble li ĉagreniĝis pro la malaltvalora eklezia muziko dum li estis romkatolika pastro en Glarus. Aŭ la eklezia muziko estis por li tro multe signo por la romkatolika rito. Per memsperto li devis ekkoni, ke la muziko estas la plej bona ilo por stabiligi fundamentajn erarojn. Eklezia muziko kiel danĝero por la reformacio. – Eble li ankaŭ spertis la orgenon kiel nepopularan instrumenton. Sed li amis la popularan muzikon. Eble tial li ekzilis la orgenojn el la preĝejoj, ekzemple el la Monastero en Zuriko. Memoru, ke dum la reformacia tempo furiozis la ikonoklasteco (aŭ: ikonrompo, germane: Bildersturm). La kanajlaro, malbonaj hordoj, ruinigis bildojn, statuojn kaj orgenojn. Tio okazis ankaŭ en la regionoj de la kalvina reformacio.

Johano Kalvino (Jean Calvin) naskiĝis en Francujo kaj laboris en Genevo. Ni ne scias ĉu li estis muzikema, havis talenton por muziko.

Same kiel la komponisto Händel, li studis, laŭ la deziro de sia patro, jurosciencon. Sed Händel ĉesigis ĉi studojn favore al la muziko, Johano Kalvino persistis kaj finis verŝajne “summa cum laude”. Grave! Kalvino neniam studis teologion. Li studis la

ADORU — LITURGIA JARO

350

1. Spi - ri - to de la ve - ro,
kaj ce - dos at - mo - sfe - ro

al - ve - nu in - ter ru.
de tromp' kaj i - lu - zi'.

El - ver - ŝu faj - ron sank - tan.

El li - poj kaj el kor'

flu - i - gu pli kon - stan - tan

fid - kan - ton al Sin - jor'.

helenan kaj hebrean lingvojn. La lernado de tiuj lingvoj estis antaŭkondiĉo por labori kiel humanisto, la idealo de geniuloj dum la epoko de Renesanco. Ni mencias la famajn nomojn Erasmo el Roterdamo, Filipino Melanktono kaj Johano Reŭhĥlino [Johannes Reuchlin]. Kalvino eble spertis la reformacion ĉefe kiel intelektan, racian fenomenon, kaj malpli kiel fenomenon de pieco kaj liturgio. Tio klarigus la decidon traduki la tutan psalmaron en rimantaj strofaj kantoj, memkompreneble en la franca lingvo. Tial Kalvino estiĝis unu el la plej eminentaj patroj de la eklezia kanto. Tiuj kantoj de la psalmaro de Ĝenevo estis prototipoj por multaj aliaj kolektaĵoj de ekleziaj kantoj, mem en la romkatolika eklezio. Exemple de la fama Caspar Ulenberg, vidu ADORU 333 (Nun lobet Gott im hohen Thron).

Psalmokantoj

Kun la temo Psalmokantoj ni atingas Martenon Luteron, kiu ankaŭ verkis famajn psalmokantojn. Kaŭze de lia brutala patro li estis dumvive grave traŭmatizita. Por la alttalenta homo, la muziko estis terapio. Mi citas lin el la evangelia himnaro de Germanujo. *“La muziko estas la plej bona donaco de Dio. Ĝi povas forpeli multajn kaj gravajn atakojn de la satano. Muziko estas la plej bona konsolo por homoj konfuzitaj, mem se ili povas nur iomete kanti. Muziko estas instruisto kaj mildigas, molkorigas, kaj prudentigas la homojn.”* Do li ne malpermesis al si mem, kiel Zvinglo faris, ĝui la muzikon, sed li uzis la muzikon kiel memterapion. Tion ebligas la ludado sur liuto. Ĉi-tiun

mallaŭtan instrumenton li povis uzi ankaŭ en la monaĥejo.

Mi revenas al la psalmokantoj. Lutero tradukis ja la psalmaron al la germana lingvo, kiel la tutan Bibliion, sed li tradukis en lirika prozo. Kiam li verkis psalmokantojn similajn al la Psalmaro de Ĝenevo, li aldonis pensojn el la Nova Testamento en senco reformacia. Ekzemple ADORU 747 Strofo 2 (Ein feste Burg). Ni trovas tie la nomon de Jesuo. Lutero do interpretas la psalmotekstojn en la senco de la Nova Testamento.

Ekzemple liaj kantoj por la liturgia jaro li sekvas la modelon de la Morava Frataro. Vidu la faman “El alt’ ĉiela venas mi” ADORU 252 aŭ ADORU 326 (Jesus Christus, unser Heiland), paska kanto. Interesa ekzemplo estas la pentekosta himno “Veni creator

ADORU 346 LITURGIA JARO 694

1. Ve - nu, Kre - an - to, Di - Spi - rit',
latine: 1. Ve - ni, Cre - a - tor Spi - ri - tus,
hej - mi - ĝu al fi - de - la kor';
men - tes tu - o - rum vi - si - ta:
al ĉi - u Vi - a viv - kre - it'
im - ple su - per - na gra - ti - a,
a - bun - don do - nu da fa - vor'.
quae tu cre - as - ti pec - to - ra.
7a strofo: A - men. (Ha - le - lu - ja.)
2. Nomiĝas Vi la Paraklet',
donaco de la Plejaltul',
spirita unкто, fajr-impet',
viviga fonto, amo-brul'.

spiritus”. Ni rigardas unue la originalan gregorian version en ADORU 346, kiu estas uzebla por liturgiaj specialistoj. Due ni rigardas la version simpligitan en ADORU 347, uzeblan eble por romkatolika komunumo, citita laŭ “Neues Gotteslob”, la aktuala nova katolika himnaro. La version de Lutero ni trovas sub la numero 126 en la Evangelia Himnaro, la aktuala protestanta kanto-libro de Germanujo. Tiu versio estas la plej simple uzebla por ĉiu ajn. Vidu ĉi tie:

*Komm, Gott Schöpfer, Heiliger Geist
be such das Herz der Menschen dein,
mit Gnaden sie füll, denn du weisst,
dass sie dein Geschöpfe sein.*

Ĉar nur malmultaj homoj en la 16a jarcento povis legi, Lutero kaj aliaj reformitaj aŭtoroj verkis katehismokantojn. Ĉar ni nuntempe povas legi, ni ne trovas ekzemplojn en ADORU.

Ĉar Lutero uzis la romkatolikan mesmodelon, li bezonis la meskantojn (nome: Kyrie, Gloria, Credo, Sanctus, Agnus Dei) en la germana lingvo. Komence li uzis la gregoriajn melodiajn kun germanaj tekstoj. Pli poste li anstataŭis ĉi tiujn kantojn per germanaj strofokantoj, ekzemple ADORU 366 (Allein Gott in der Höh sei Ehr). La verkinto, Nikolaus Decius, estis samtempulo kun Lutero. Hodiaŭ ankaŭ en la romkatolika rito oni uzas strofokantojn anstataŭ la gregoriaj melodiaj. Ĝis nun aŭtoroj verkas tiajn liturgiajn kantojn, ankaŭ amiko Albrecht Kronenberger, ekzemple en la tiel nomata Palatinata Meso, ADORU 825.8 kaj 826.

Oni povas konstati, ke dum almenaŭ kvin jarcentoj la diferencoj inter la

826

Kredo-Kantoso:

MI kre-das Vin, Di-o,
Vin, Kris-to Je-su-o,
ĉi-o-po-va Pa-tro,
ho-mi-ĝin-ta Fi-lo,
Vi kre-is ĉi-e-lon kaj te-ron.
Vi sa-vis el mor-to la mon-don.
Vin, Sank-ta Spi-ri-to;
par-do-non de la pe-koj;
ĉi-e-lan fe-li-ĉon
por ĉi-am. A-men.

romkatolika kaj la protestanta muzik-stiloj estis kultivatataj kun ama hato. La plej grava diferenco koncernis la lingvon: la latina en la romkatolika liturgio, la naciaj lingvoj en la liturgioj laŭ la reformacio.

Do hodiaŭ tiuj diferencoj ne plu gravas. La muzikistoj tuttempe interesigas pri la muziko de la aliaj konfesioj. Bedaŭrinde mi devas konstati, ke la evoluo tute ne okazis kaŭze de la eklezioj mem, sed kaŭze de la ŝtato, la mono, la etoso de la epoko, kaj la fervoro de la fideluloj kaj muzikistoj. Bona ekzemplo estas la kristana esperanto-movado. Kaj tre rimarkinde: Hodiaŭ la romkatolika eklezia muziko estas, koncerne la Diservon, pli riĉa ol la evangelia.

La eklezia muziko ne suferas tro pro la perdo de la signifo eklezia.

La antaŭe reformacia atingiĝo, la popola muziko, hodiaŭ iĝis la plej grava danĝero. La nuntempa “popmusic” estas tiel domina, ke la tuta alia muziko havas ne pli ol marĝenan gravecon. Ĝis la lasta jarcento la komunumoj ne komprenis la latinan liturgian lingvon. Hodiaŭ la angla lingvo estas la vera “nova latino” de la eklezio. Kaj ne nur ke neniu komprenas

la tekstojn, sed ankaŭ neniu interesiĝas pri la tekstoj.

Anstataŭ festi la jubileon de la reformacio ni devus pentofari memorigante al ni la unuan tezon de Marteno Lutero: “Kiam nia sinjoro kaj majstro Jesuo Kristo diras: ‘pentu’ ktp. (Mat 4,17) li volis, ke la tuta vivo de la kredantoj estu pento!”



Postrimarko

Albrecht Kronenberger, post la korektado de mia manuskripto, proponis, ke mi aldonu ĉapitron pri la demando: “Kiamaniere sin spegulas en la himnoj specifaj trajtoj de la reformacia teologio: Kristo la sola, la Sankta Skribo kiel la sola, sole per la kredo/fido, sole per la graco.”

Tio min konvinkis, kaj mi promesis prilabori ĉi temon.

Sed poste mi dubis. Ĉu “sola” ne estus fatala slogano? Ĉu taŭgas tiu ĉi vorto hodiaŭ? Mi memoris alian sloganon: “Liberté, Égalité, Fraternité”.

Mi serĉis en ADORU iun kanton el la reformacia epoko pri “sola gracia” – kaj nenian trovis. De longe mi konas kaj eĉ instruis la kantojn: “Nun freut euch, lieben Christen gmein” (Nun ĝoju kune, karaj kristanoj) kaj “Es ist das Heil uns kommen her” (Venis al ni la savo). Ili prikantas la specifajn reformaciajn fundamentojn. De nove mi studis tiujn ĉi kantojn, kaj komprenis, kial ili ne troviĝas en ADORU. Tiuj ĉi kantoj limigas, starigas barilojn, sammaniere kiel la 4 “solaj”. Ili ofendas la spiriton de la kompreno, la spiriton de Esperanto, kaj de ADORU.

La okupiĝo pri tiu propono de Albrecht instruis al mi, ne nur kial iuj kantoj estas en ADORU, sed ankaŭ kial aliaj kantoj mankas en ADORU. Mi ankaŭ lernis, ke la muziko ne nur estas neŭtrala, sed, same kiel kostumoj kaj uniformoj, samtempe ĝi estas identiga signo. Vidu la naciajn himnojn!

Tial la reformacio havas principe du kontraŭajn sekvojn pri la muziko. Unue: ĝi disigas, kaj due: ĝi ligas kaj kunigas. La lasta ja ekzistis ĉiam, sed ofte ĝi estis tre mallaŭta. Hodiaŭ la repaciga efiko estas la nura ebla funkcio. “Sola” estis hieraŭ! La hodiaŭa vorto estas “ankaŭ”.

Tion ĉi ni povas lerni de la eklezia muziko dum kaj post la reformacio.



Aliĝintoj

al 22-a Ekumena Esperanto Kongreso 2018, Poděbrady, Ĉeĥio

1. Cousson Philippe,	Francio	14. Popoviciu E. Eugenia,	Rumanio
2. Ráczkevy-Eötvös Ágnes,	Hungario	15. Chrdle Petr,	Ĉeĥio
3. Āradsson André,	Svedio	16. Feifičová Magdaléna,	Slovakio
4. Āradsson Bengt Olof,	Svedio	17. Petrik Pavol,	Slovakio
5. Gaillard Samuel,	Francio	18. Stier Gabriella,	Rumanio
6. Stamm Sieglinde,	Aŭstrio	19. Fischer Oldřich Arnošt,	Ĉeĥio
7. Farkas Antal,	Rumanio	20. Šváček Miloslav,	Ĉeĥio
8. Pospíšil Václav,	Ĉeĥio	21. Dubinová Jindřiška,	Ĉeĥio
9. Pospíšilová Ria,	Ĉeĥio	22. Lászlo Maria,	Hungario
10. Polnický Pavel,	Ĉeĥio	23. Šcurt Terezia-Ildiko,	Rumanio
11. Belošević Marija,	Kroatio	24. Schaeffer Hedwig,	Germanio
12. Belošević Krešimir,	Kroatio	25. Schaeffer Karl Heinz,	Germanio
13. Oláh Margit Judit,	Rumanio	26. Klimeš Pavel,	Ĉeĥio

NE FORGESU ALIĜI !

La tempo rapide forflugas.

Do tuj aliĝu al 22-a EEK 2018 en Poděbrady. La Plej malalta garantia sumo validas nur ĝis la fino de la jaro 2017!! Aliĝilon vi trovas en DR nr 5.

Sur la foto vi vidas flor-horloĝon en Poděbrady



Eldonejo KAVA-PECH jubileas

Petr CHRDLÉ, CZ

KAVA-PECH estas mallongigo en la ĉeĥa kun la signifo Kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle. De tio klaras, ke ĝia ĉefa agado ne estis eldonado de libroj. Tamen, post la pensiigo ĝia posedanto ĉesis ĉiujn ceterajn agadojn kaj plu okupiĝas nur pri sia hobbio, eldonado de libroj. Ĉar la unuan libron la eldonejo eldonis en oktobro 1992, ĵus ĝi solenis 25 jarojn de sia ekzisto.

KAVA-PECH apartenas al malgrandaj eldonejoj. Dum 25 jaroj ĝi eldonis nur 197 librojn kun propra ISBN (Internacia Norma Libronumero). Inter ili preskaŭ duono rilatas al Esperanto: ĉu ili estas originaloj aŭ tradukaĵoj skribitaj en Esperanto, ĉu lernolibroj aŭ vortaroj, ĉu tradukoj el Esperanto nacilingven, kompreneble plejparte en la ĉeĥan. Similan nombron da libroj ĝi produktis laŭmende, kio signifas kun ISBN de alia eldonejo aŭ por memeldonistoj sen ISBN, tiujn ofte ankaŭ en Esperanto, ekzemple por SAT (interalie la du lastaj eldonoj de PIV), FEL, IEI, ESE; sed ankaŭ en naciaj lingvoj, krom en la ĉeĥa ekzemple en la angla, franca, sveda, eĉ korea; tamen en la fono de eksterlandaj mendantoj estis preskaŭ ĉiam esperantistoj.

Al esperantistoj-kristanoj certe estas pleje konataj la libroj de KAVA-PECH, kiuj rekte rilatas al kristanismo. Ni menciui la novan eldonon de la *Biblio*

editorita de IKUE kaj KELI, *Konciza historio de Kristanismo* de Gerrit Berveling, *Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj* de Max Kašparů, *Spirita revolucio en la koro de Eŭropo* de Přemysl Pitter en traduko de Margit Turková, pritraktanta la spiritan tradicion en la ĉeĥa historio, plejparte rilatanta la reformacion, *Heroo de amo* de Karel Kraft priskribanta la vivon de Přemysl Pitter, *La vojo al harmonio* (Komenius – Zamenhof) de Jaroslav Karhan, aŭ jam elĉerpitaj *La skandalo pro Jozefo*, psikologia rigardo al la malnovtestamenta evento de Jozefo en Egiptio de Valdemar Vinař kaj *La Dresdena Sinjorina preĝejo* de Jürgen Helfricht en traduko de Benoît Philippe.

Jam eblas malkaŝi preparojn por la eldono de la ĉefaj ĉapitroj el la plej grava verko de Jan Hus *La Eklezio* en traduko de Gerrit Berveling. Ĝi devus esti lanĉita plej malfrue en Poděbrady ene de la ekumena kongreso en aŭgusto 2018.

Certe ankaŭ menciindas, ke en decembro 2016 KAVA-PECH estis enskribita en la Ĉeĥan libron de rekordoj kiel la eldonejo, kiu eksportis propre eldonitajn librojn al plej multe da landoj de la mondo (tiutempe 64), kun la mencio, ke tio okazis precipe per eksporto de la libroj skribitaj en Esperanto. Reale estas eĉ pli da landoj, kie oni legas ĝiajn librojn, ĉar en tiu nombro estas nur tiuj, pri kiuj eblis pruvi

rektan eksporton (per fakturoj aŭ liverolistoj), sed multaj esperantistoj aĉetas librojn nerekte, ekzemple ĉe la libroservoj de UEA aŭ FEL, aŭ dum porokazaj libroservoj ene de Esperanto-aranĝoj, kiujn oni ne povas pruvi, do ili ne povis esti alkalkulitaj.

Kiel menciite, en oktobro la eldonejo KAVA-PECH festis la kvaronjarcentan jubileon. La festeno okazis en la salonoj de la sidejo de, kaj kunlabore kun la Unio de ĉeĥaj interpretistoj kaj tradukistoj, kun kiu KAVA-PECH multjare kunlaboras. Tial ĝi estis kunigita kun lanĉo de du ĉi-jare eldonitaj vortaroj: Jam la 4a eldono de *Slovaka-ĉeĥa kaj ĉeĥa-slovaka vortaro por vojaĝantoj* (= de diferencaj esprimoj), verkitaj de esperantistoj Vladimír Němec (†) kaj Magdalena Feifičová (inter esperantistoj konata kiel Fejfi), kaj la freŝe eldonita *Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro* de Miroslav Malovec, enhavanta sur 583 paĝoj proks. 16 000 kapvortojn kaj 40 000 vort-derivaĵojn. La vortarojn venis prezenti iliaj aŭtoroj (el la slovaka urbo Žilina kaj el Brno).

Kiel unikaĵo estis prezentita la ĵus eldonita ampleksa verko (385 paĝa) de

poeziaĵoj *La ŝtono de amo* de fama kosova poeto Sali Bashota verkita en la albana, esperantigita de Bardhyl Selimi, unikaĵo duobla, ĉar ne troveblas en katalogoj ĝis nun iu kosova poezio en Esperanto, kaj ankaŭ ne iu eldonita en Ĉeĥio.



La bonan etoson prizorgis Pavla Dvořáková kun gitaro, kiu sukcesis kantigi la publikon, konsistinta el proksimume 70 ĉeestantoj, el kiuj eble duono estis esperantistoj. Ŝi elektis kantojn konvene al la lanĉitaj vortaroj, do oni kantis en la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj kaj en Esperanto. Ĉar la tekstoj estis projekciataj kaj temis pri kantoj konataj ankaŭ en la ĉeĥa, povis kunkanti la esperantajn versiojn ankaŭ ne-esperantistoj.

En unu salono estis prezentitaj sur du longaj tablovcioj ĉiuj libroj de KAVA-PECH momente ofertataj. Sur unu estis la libroj en la ĉeĥa, sur la dua en Esperanto. Eblis ilin ne nur trarigardi, sed ankaŭ aĉeti kun grandaj porokazaj rabatoj, kion multaj vizitantoj profitis.

Ne mankis ankaŭ refreŝiĝo kaj vino por tosti. La festeno trapasis en agrabla



etoso. Kaj pro la programo parte en Esperanto, ekspozicio de la Esperanto-libroj, kaj ĉeesto de multaj esperantistoj la aranĝo havis ankaŭ kroman efikon, per netruda maniero informi ne-esperantistojn pri Esperanto.

Rimarko de la redaktoro: Ni deziru al Petro sanon, kaj en la venontaj jaroj plurajn sukcesajn eldonaĵojn.



Meze starante vi vidas Petr CHRDLE. La aliaj estas, de maldekstre, Tomáš Břicháček, Miroslav Malovec, Magdaléna Fejfičová, Petr Kautský.

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

15. decembro

Kara Kreinto, ni dankas Vin pro la majstro Zamenhof, kiun Vi inspiris verki la internacian lingvon. Per ĝi ni nun estas ligitaj en preĝoj, kie ajn ni loĝas. Mirinda, genia eltrovaĵo ĝi estas; inspiru nin disvastigi ĝin.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 122). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Kristana amo – kiel agas

Mark HAMME, Usono

Saluton fratoj kaj fratinoj

Mi estas nova samideano, kaj kredanto dum dek jaroj, sed malliberulo ekde 2013. Mi estas poeto, lingvisto, kaj verkisto. Mi legas la Bibliion ĉiutage angle, france, hispane, germane kaj esperante. Mi legas ĝoje la Dia Regno-n kaj mi studas profunde la Bibliion. Mi verkas variajn studojn de la Biblio kiel la jena. Miaj informoj estas malsupre se vi volas kontakti min, ĉar mi estas ankaŭ korespondanto.

En la Dia Regno No 2, kredanto verkis bonan artikolon pri amo. La kurioza aspekto de la vorto *amo* estas ke ne ekzistas biblia difino de NUR tiu vorto. Se vi havas dubon, legu Hebreoj 11,1 “*Kaj la fido estas realigo de esperataĵoj, provado de aferoj ne vidataj*” kaj Romanoj 8,24 “*Ĉar per espero ni estas savitaj; sed la espero, kiu estas vidata, ne estas espero; ĉar kiu esperas al tio, kion li vidas?*” rilate al fido kaj espero; la fido plene difinita kaj la espero, io atendita sed ne jam vidita.

Bone, la amo estas la nura aĵo, kiu estas difinita per siaj agadoj. La plej klara montrado de tio estas 1 Korintanoj 13,4-8. Kvankam tiuj skriboj estas bone konataj, mi invitas, ke vi legu tiujn ĉi foje demandante vin, ĉu mi/vi agas tielmaniere?

“*Amo longe suferas, kaj bonfaras; amo ne envidas; amo ne fanfaronas, ne ŝveligas sin, ne kondukas maldece, ne celas por si mem, ne koleriĝas, ne pripensas malbonon, ne ĝojas pri maljusteco, sed kunĝojas kun vereco; ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas. Amo neniam pereas...*”

Tiuj vortoj gravas, ĉar Jesuo diris, ke per la amo inter kristanoj, scios la homoj, ke ni estas liaj disĉiploj (Joh 13,35). Ankaŭ gravas, ĉar amo estas frukto, aŭ atestaĵo, ke ni havas la Spiriton de Dio (Gal 5,22).

La demandoj restas: kiel montri amon praktike, kaj ĉu ni devas diferencigi la amon inter kredantoj kaj la amon de homoj ĝenerale? La biblia respondo surprizas multajn personojn.

Eble vi jam scias, ke la Biblio parolas pri ĉiu tipo de amo, sed la Biblio nur nomas du tipojn de amo per nomo.

Unue, la Biblio parolas pri ĝenerala amo. Kvankam tio (agape, greke) povas inkludi afekcion, estas bazata aŭ fondita sur principo: montri amon ĉar oni DEVAS fari tion. Dio montras Sian amon kiam “Li sendis Sian solenaskitan Filon... por ke la mondo per li estu savita...” (Joh 3,16-17). Tielmaniere ni devas ami niajn malamikojn kaj persekutantojn (Mat 5,43). Kaj precipe, ni montras amon al la homoj de la mondo volonte, dividante la evangelion de Dio (1 Tes 2,8). Sed la amo ne devas esti nur manifestaĵo, sed amo kiu spegulas la koron, animon, forton, kaj menson.

Pri amo al ĉiuj, la Biblio diras “Tial laŭ oportuna tempo ni bonfaradu al ĉiuj, PRECIPE al tiuj, kiuj apartenas al la familio de fido” (Gal 6,10) Estas inde pensi pri la fakto, ke post la morto de Jesuo, la disĉiploj ne faris grandajn almozajn agojn por la ĝenerala mondo. Sed ili ja faradis tiujn elkore por la familio de Dio.

Pri la amo inter kredantoj, kaj inter kredantoj kaj Jesuo kaj Dio, la Biblio uzas alian vorton, *philia* (greke). Tial, kiam Jesuo demandis al Petro, “Ĉu vi amas min?” (Joh 21,15) la amo signifis “Esti amiko, havi afektaĵon por kaj personan afiksadon kiel afero de sento kaj patoso, sed agapáo (la verba formo de agapé) estas pli larĝa, ampleksante la juĝon kaj la intencan konsenton de la volo kiel afero de principo, obligo, kaj ĝusteco (sen aŭ kun afekto). Laŭ James Strong's Exhaustive Concordance of the Bible 1890 p 75,76 en sia greka vortaro. Fakte, ni ne devas ami (agapeo) la mondon, aŭ la parton de la mondo, kiu estas aliproprigita de Dio (1 Joh 2,15-17).

Do, kiel montras sin la amo (philiá)? Bone, ni jam legis 1 kor 13,4-8, tial ne ekzistas spaco por malamo de nenio, speciale la fratoj. NENIU povas ami Dion kaj malami sian fraton. (1 Joh 4,20-21). “Amo ne pripensas malbonon...” 13,5. Ĉu vi pardonas libere kaj elkore?

“Antaŭ ĈIO havante fervoran amon unu al alia, ĉar amo kovras amason de pekoj.” (1 Petr 4,8) Ĉiu el ni ofendas al Dio senlime ĉiutage. Ĉu ni ne devas pardoni unu al la alia? Multaj kristanoj ja estas pretaj morti por siaj familioj kaj siaj fratoj de la eklezio, kaj eble personoj de la mondo ĝenerale, sed al ili mankas io: En Johano 13,34, Jesuo diris, “Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian KIEL ML AMAS VIN, tiel vi ankaŭ amu unu la aliajn, Kiam Jesuo diris tion, Li ne jam mortis, sed li ja vivadis por la disĉiploj. Ĉu ni estas pretaj morti por niaj fratoj, sed “ni havas posedaĵojn kaj vidas sian fraton havante bezonon” kaj ne volas helpi lin? La amo de Dio ne estas en ni (1 Joh 3,17). Eble ĝenas nin, viziti lin, kuraĝigi lin, aŭ doni al li transportaĵon, sed ame ni faras tion.

Laŭ Mateo 25,34-40, kion ni faras al la fratoj de Jesuo, ni faras al Li, inkluzive malliberuloj (Mat 25,34-40) “Infanetoj, ni amu, ne laŭ vorto nek lango, sed laŭ faro kaj vero.”

Se vi volas, kontaktu min ĉe:

Mark Hamme

#33391-379

United States Penitentiary

Tucson P.O. Box 24550

Tucson, AZ 85734

Usono

Karaj legantoj, kiel mi jam skribis je la komenco, mi volonte korespondas kun samideanoj. Ne hezitu kontakti min.

Mark

Membrigo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

Kotizoj de KELI 2018

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI,	16,00 EUR
pagante tra libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni ESPERO KATOLIKA pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni DIA REGNO pere de C.O. de IKUE	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	3,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n)	Donaco

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtĝire al **UEA**, Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**
konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97
Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50
Svedio 74374-0
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciu:
por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
☎ +36 302 000 306; ✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Membrigo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa
reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

Landaj kotizoj:

Britio:	15 GBP	
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006		Jean Bisset, 47 Airbles Crescent,
"Fellowship of British Christian		Motherwell, ML1 3AP;
Esperantists (FBCE). Kasisto: S-ino		✉ jean@bisset100.freeserve.co.uk

- Bulgario** *)
 Peranto: S-ino Ivanka Kircheva
 Stoyanova
 P.O. Box 701, BG-9000 Varna
 ☎ + 359 52 639628,
 ✉ ivanka_esperanto@abv.bg
- Ĉeĥa Respubliko** 300 CZK
 kaj
- Slovaka Respubliko** 16 EUR
 Peranto: Pavel Polnický,
 Lidická 939/11,
 CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
 ☎ +420 723 672 335,
 ✉ polnickypavel@seznam.cz
- Estonio** *)
 Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,
 EE-10502 Tallin,
 ✉ endel.ojasild@gmail.com
- Finnlando** 30 EUR
 Eblas aboni Dia Regnon uzante
 landan peranton de UEA aŭ laŭ la
 pagmanieroj menciitaj sur antaŭa
 paĝo.
- Francio** 25 EUR
 CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
 “Franca Evangelia Esperanto-Ligo
 (FEEL)”. Kasisto: Samuel Gaillard,
 5 rue Maurice Ravel,
 FR-63800 Cournon d’Auvergne
 ☎ +33 (0)4 73 84 31 31,
 ✉ samuel.gaillard@ac-clermont.fr
- Germanio** 24 EUR
 Evang. DarlehnsGenossenschaft
 Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
 “Esperanto-Liga für Christen in
 Deutschland e.V.”
 Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-
 Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,
 ☎ 02573 / 626,
 ✉ hetifisch@googlemail.com
- Hungario** *)
 Peranto: Irén Bagi, Baross u.
 54/B.II.8, HU 1201 Budapest
 ☎ 01 283 6566
- Japanio** 20 EUR
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Korea Respubliko** 20 EUR
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Nederlando** 20 EUR
 Vidu sub la pagmanieroj sur la
 antaŭa paĝo
- Pollando** 30 PLN
- Rumanio** *)
 Peranto: Maria László, OF1.C.P.
 38 Exterior, 4800 Baia-Mare
 ☎ 062 426182,
 ✉ laszlo_maria@yahoo.com
- Rusio** *)
 Peranto: Larisa Kuzmenko,
 Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil,
 Sverdlovskaja Obl. Rusio,
 ✉ klarisa8@yandex.ru
- Slovaka Respubliko** 16 EUR
 Vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko
- Svedio** 20 EUR
 Pagu al la sveda UEA-konto
 (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)
- Svislando** 20 EUR
 Pagu al la svislanda UEA-konto
 (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)
- Usono** 30 USD
 Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton
 al la peranto: Jerald T. Veit, 3578
 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
 ✉ jeraldveit@yahoo.com

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

informejoj

GRAVA PETO

Okaze de venontjara EEK en Poděbrady mi volus prepari malgrandan ekspozicion pri la 1-a EEK, kiu okazis antaŭ 50 jaroj en urbo Limburg, do en la jaro 1968. Se vi partoprenis tiun kongreson kaj havas iajn dokumentojn aŭ fotojn, estu tiel afabla kaj sendu ĉion al mia adreso (vidu 2-an paĝon).



Pastroj/pastoroj kiuj partoprenis la EEK en 1968

Ni povos poste resendi ĉion al vi. Sincere dankas Pavel Polnický, sekretario de KELI.



ATENTIGO

Tiuj kiuj ricevis kun la Dia Regno 4/17 urĝletereton kaj ĝis nun ne pagis kaj ne kontaktis min, mi denove atentigas, ke tiu-ĉi numero de DR estas lasta, kiun vi ricevas!

Skribu tuj al sekretario!!

Bibliaj Tagoj 2018

Karaj samideanoj, bonvolu atenti la ĉiam plej aktualan aliĝilon por la Bibliaj Tagoj 2018 en Mainz ĉe: www.esperanto.de/keli => Esperanto-version alklaki.

Lastaj litoj atendas Vin!

Ĉiun aliĝon mi respondos. Se vi ne ricevos respondon, skribu rekte al: fischru@uni-muenster.de

Kun samideanaj salutoj

Rudolf Fischer
komisiito de KELI/Germanujo
kaj de IKUE/Germanujo

**Bibliaj Tagoj
en Mainz**
de la 7a ĝis la 11a de marto 2018
(merkredo - dimanĉo)



Belan kristnaskan feston & Sukcesan novan jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ & Bengt Olof ÅRADSSON

Aŭtunaj ŝtormoj muĝas

(originale verkita en Esperanto)

1. Aŭ - tu - naj ŝtor - moj mu - ĝas,
2. Ĉi - el' ne ĉi - am blu - os,
3. Sed ve - nos pri - ma - ve - ro

so - mer' jam es - tas for, _____
nek flu - os lakt', mi - el'. _____
kun no - va flo - ro - ben'. _____

kaj gru - oĵ su - den fu - ĝas,
Foj - fo - je ŝtorm' nin sku - os,
Ho, dan - kon pro la te - ro,

mal - mul - tas su - na or'. _____
in - un - dos nin mal - hel'. _____
la Di - a vi - vo - plen'! _____

Chords: C, Am⁷, C, C⁷, F, C, Em⁷, Am⁷, Em, Am, Em, Am⁷, F, G⁷, C⁴, 3

AŬTUNAJ ŜTORMOJ MUĜAS • M kaj E (originale verkita):
Albrecht Kronenberger 2017-10-09